(Versio 2009-07-12)

# Eblaj prioritatoj de la strategio por Esperanto: Amaskomunikilaj rilatoj kaj renkontiĝoj

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand

Kiam oni pripensas, kiun strategion sekvu Esperanto-organizo, eble unue oni demandu sin, kio estas la ĝeneralaj celoj. Ekzistas pli malpli kvin sintenoj rilate al tio.

## Kvin sintenoj pri Esperanto

- Oni povas celi la ĝeneralan enkondukon de Esperanto pere de politikistaj decidoj (**desuprisma vojo)**.
- Oni povas celi la ĝeneralan enkondukon de Esperanto pere de la kreskigo de la Esperanto-parolantaro (**desubisma vojo)**.
- Oni povas labori por la **daŭra kreskigo** de Esperantujo sen havi por tio jam klare difinitan celon aŭ finon, ekzemple provizore ĝis duobliĝo aŭ dekobliĝo de la parolantaro.
- Oni povas ne interesiĝi pri ĝenerala enkonduko aŭ kreskigo, sed deziri **stabiligon** de la Esperanto-komunumo pere de plivastigo de ĝiaj diversaj kulturaj kaj aliaj ofertoj.
- Oni povas entute ne interesiĝi pri ĝenerala enkonduko, kreskigo aŭ stabiligo, sed simple deziri **partopreni** en la vivo de Esperantujo. (Kvankam tia partopreno origine ne havas tiun celon, ĝi ja kontribuas al la stabiligo kaj eble eĉ kreskigo de Esperantujo.)

Por faciligi paroli pri tiuj kvin sintenoj, oni povas nomi ilin ekzemple **desuprismo, desubismo, kreskigo, stabiligo kaj partopreno**. Per la nocio *finvenkismo* oni kutime celas desuprisman agadon, per la nocio *raŭmismo* kutime stabiligan. (Pri la temo kp. la artikolon pri „Strategioj por Esperanto“ en Vikipedio, kiu prezentas ankaŭ diversajn deklarojn de la Esperanto-komunumo ekde 1905.)

## Kreskigo subtenas aliajn agadojn

Desubismo kaj kreskigo havos dum longa tempo de la estonteco, eble dum pluraj jardekoj, tre similan vojon; ĉi-sekve ili estas komune nomataj „kreskigo“; pro la sameco de la vojo oni cetere ne devas nun decidi, kiun el la du elekti – kaj multaj ankaŭ ne faras tion. Krome ilia agado subtenas la tri aliajn sintenojn: La argumentado ĉe politikistoj fariĝas pli facila, se Esperantujo montras videblan kaj mezureblan kreskadon. La kresko subtenas ankaŭ la kreadon de kulturaj ofertoj, kiuj ja bezonas publikon kaj klientaron. Fine per kreskado la oferto por partopreni en Esperantujo grandiĝas. Konflikto inter kreskigo kaj aliaj sintenoj povas estiĝi nur per tio, ke anoj de aliaj sintenoj (desuprismo kaj stabiligo) kompreneble preferus rektan helpon en sia agado, ne nur subtenon per kresko.

Parolante pri kreskigo de Esperantujo indas iom pli klare difini ĝin. Se oni instruas Esperanton al komencantoj kaj levas tiujn ĝis la nivelo de memstara parolanto, kiu iom konas kaj rilatas al la komunumo, tio certe estas kreskiga agado. Pri tio same temas, se iu agado levas la lingvan nivelon de iu jama parolanto – ĉu per formala instruado, ĉu per oferto de ebleco uzi la lingvon, en renkontiĝo, rete, gazete aŭ per libro. Ankaŭ revenigi iun al Esperantujo, kiu jam ne plu aktive uzis la lingvon, aŭ igi lin aŭ ŝin pli aktiva estas kreskigo de Esperantujo.

## Kreskokriterio: Ĉiujaraj uzohoroj de Esperanto

Anstataŭ la kriterio „kvanto de parolantoj“ kun la ĉiamaj diskutoj pri la difino rilate al la lingva nivelo kaj la ofteco de uzado, oni eble apliku por la grandeco de Esperantujo la kriterion de la **sumo de la ĉiujaraj uzadohoroj (aŭ -tagoj) de Esperanto**. Certe ne eblas nun ekzakte mezuri tiun ĉi kvanton, sed ja eblas taksi progreson. Kaj principe ankaŭ eblus iam fari

takson pri la suma tempo, dum kiu Esperanto-parolantoj legas librojn, gazetojn, interretajn paĝojn, skribas retmesaĝojn kaj aliaj ĉekomputilajn tekstojn, partoprenas en diversaj renkontiĝoj kaj tie aŭskultas aŭ parolas. (Ekzemple: Universala Kongreso kun dumil partoprenantoj, kiuj restas mezume ses plenajn tagojn, kreas ĉ. 12.000 uzotagojn, eble 120.000 uzohorojn. Libro, kiun cent homoj legas dum po kvin horoj, kreas 500 uzohorojn. Se nuntempe 10.000 homoj ĉiutage retumas dum mezume duona horo, tio signifas jare 1,8 milionojn da uzohoroj. Ktp.) Kreskigi tiun sumon de uzohoroj eblas en pluraj direktoj – ekzemple instrui la lingvon, pluinstrui ĝin por doni la kapablon ĝue uzi la lingvon kaj instigi al la diversaj formoj de Esperanto-uzado. Kompreneble ekzistas amaso da laboretoj, kiuj subtenas tiujn agadojn.

**Aldoni tion, kio mankas**

Se oni opinias, ke ĝuste kreskigo plej konvenas al la propraj opinioj kaj deziroj pri agado, ekstaras la demando, kiel plej efike subteni tion. Ja la rimedoj (mono kaj laborfortoj) estas limigitaj kaj ne estas espero, ke ili rapide kreskos. Ĉe la elekto ludas rolon ne nur, kio entute devas esti farata. Pli multe gravas la prijuĝo, kiuj agadoj estas jam farataj de iuj, kiuj supozeble pretus plivastigi sian agadon, kaj kiuj agadoj esencaj por plua kresko kontraste ne estas farataj.

Ekzistas por entreprenoj kaj unuopuloj tiel nomata „strategio koncentrita al mallarĝaĵoj“ de iu sinjoro Mewes (kaj la ideo certe troveblas ĉe multaj aliaj homoj). („Mallarĝaĵo“ celas mallarĝan lokon en vojo, tiun lokon, kiu difinas la maksimuman larĝecon de veturiloj; oni povas uzi tiun bildon ankaŭ por agadoj.) Por krei iun finan rezulton necesas multaj agadoj; Mewes konsilas eltrovi, kie estas la ĉefa problemo, la plej „mallarĝa“ loko. En agrikulturo ekzemple ne indas aldoni pli da akvo, se estas sufiĉe da; ne indas plian fojon sarki, se preskaŭ ne estas trudherboj – sed eble el la diversaj sterkumoj mankas precize unu; tiun indas eltrovi kaj aldoni.

Rilate al Esperantujo (kaj simile rilate al ĉiu unuopa agado en ĝi) supozeble indas agi same. Ekzemple ne okazos rimarkinda kresko de Esperantujo, se oni eldonos plian poezian libron. Tio neniel celas malaprobi la verkadon aŭ la eldonadon – sed tamen ĝi supozeble ne estas la plej efika agado por ĝuste kreskigo (sed certe subtena por la stabiligo).

Se mi rerigardas al la pasintaj tridek jaroj, en kiuj mi kunlaboris en Esperantujo, mi havas la impreson, ke la nomitaj „mallarĝaĵoj“ por la kreskigo troviĝas ĉefe en du kampoj, nome renkontiĝoj kaj amaskomunikilaj rilatoj. Konsiderante unue la renkontiĝojn mi havas la impreson, ke la kresko de unuopa renkontiĝo estas limigita.

**Kreskigo de renkontiĝoj**

Ni povas konstati, ke la Universalaj Kongresoj atingis grandecon de mil aŭ pluraj mil homoj. La variado dependas multe de la lando – ĉu mezeŭropa, ĉu randa – ĉu okcidenta, ĉu orienta – ĉu eŭropa, ĉu ekstereŭropa. Tio iom malfaciligas prijuĝi la statistikon. Sed ŝajnas, ke la kreskado de Universalaj Kongresoj venis al supra limo, kiun ne eblas facile superi – kongreson de pluraj mil homoj oni havis jam en la dudekaj jaroj. En la pasintaj jardekoj aldoniĝis kontinentaj kongresoj (amerika, azia kaj eŭropa; survojas afrika) – kaj videblas, ke la suma partoprenantaro per tio kreskis.

Simile ĉe la germana Printempa Semajno Internacia (PSI) oni povas konstati, ke ĝia kresko malrapidiĝis dum la pasintaj dek kvin jaroj, ekde kiam ĝi atingis partoprenantaron de preskaŭ 150 homoj; la kresko falis al ĉ. 1,5 procentoj jare. (Kontraste en la komencaj dek jaroj okazis rapida kresko de 35 al 144 homoj, estis do pli ol dekprocenta jara kresko.) Aldoniĝis en la pasintaj jaroj Novjara Renkontiĝo kaj SOMERE kaj konstateblas, ke la suma partoprenantaro de la nun kvin unu- aŭ dusemajnaj renkontiĝoj por plenkreskuloj kaj infanoj en Germanio

(inkluzive de IF kaj SEFT) post la aldono kreskis en kvin jaroj de ĉ. 430 al ĉ. 600 homoj, pli ol kvin procentoj jare.

Verŝajne la kvanto de renkontiĝoj estis limo por la plua kresko, ĉar renkontiĝoj kutime ne emas senhalte kreski; la partoprenantoj ne deziras malaperi en tro granda homgrupo. Aldoni pliajn renkontiĝojn por plia speciala celgrupo forigis la limon. Evidente estis kelkaj Esperanto-parolantoj, kiujn la ĝistiamaj renkontiĝoj ne sufiĉe logis. Eble oni povas ankoraŭ aldoni plian renkontiĝon por plia celgrupo – sed certe iam venos la limo de la entuta nombro de Esperanto-parolantoj. Necesos do levi tiun nombron, se oni deziras pluan kreskigon de Esperantujo. Por fari tion ne sufiĉas la renkontiĝo mem, kvankam oni povas oferti instruadon dum la renkontiĝo – sed oni devas havi ankaŭ sufiĉe da kursanoj. Renkontiĝoj kutime ne allogas sufiĉe da ili por certigi konsiderindan kreskon de Esperantujo.

**Efikece informi la publikon: Amaskomunikilaj rilatoj**

Rilate al la kreado de novaj Esperanto-parolantoj tre grava preparado estas la informado de la publiko. Se la homoj vidas en Esperanto kaj en Esperantujo ion interesan, ili volas scii pli kaj kelkaj certe ek- kaj plulernos la lingvon kaj aperos en niaj rondoj. Unu el la plej efikecaj manieroj por transdoni informon al la publiko estas transdoni ĝin pere de amaskomunikiloj.

Se oni elektas taŭgan eventon, ekzemple centpersonan internacian renkontiĝon, kaj informas sufiĉe bone, la efiko de nuraj dudek aŭ tridek laborhoroj kutime estas pluraj gazetaj artikoloj, eble eĉ programero en radio aŭ televido, eble novaĵagenteja informo, kiun transprenas pliaj amaskomunikiloj. Tiel eblas informi centmilojn, kelkfoje milionojn da homoj pri Esperanto per malmulta tempo. Tia efikeco ne eblas per paperaj informiloj aŭ per niaj interretejoj. Krome informoj en la amaskomunikiloj ĝuas certan renomon ĉe la loĝantaro – fakte prave, ĉar ilin akceptis kaj prilaboris ankaŭ eksteruloj. Kompreneble tio signifas, ke ni ne povas atendi, ke amaskomunikiloj transprenas senŝanĝe niajn tekstojn – aŭ eble grandparte jes, se ni preparas ilin jam el la vidpunkto de eksterulo.

Internaciaj renkontiĝoj estas tre bona ebleco por informi la amaskomunikilojn kaj tiel la ĝeneralan publikon. Niaj renkontiĝoj krome bone montras la esencon de Esperanto – internaciaj renkontoj, sed ankaŭ libroj kaj muziko – kaj do estas en nia intereso ĝuste tion montri al la publiko. Estas cetere tre malfacile atingi la intereson de ĵurnalistoj per aliaj rimedoj aŭ dum aliaj okazoj. Ili jes de tempo al tempo raportas pri Esperanto kaj lingvaj temoj, sed la probablo, ke ili faras tion, estas multe pli granda, se antaŭe dum pluraj jaroj aperis informoj pri Esperanto-renkontiĝoj en amaskomunikiloj de la koncerna regiono aŭ lando. Sekve estas vere bedaŭrinde ellasi tiun bonegan ŝancon informi la amaskomunikilojn kaj la publikon pri la vivo de Esperantujo. Se la organizantoj de renkontiĝo ne eluzas tiun eblecon, ili ellasas gravan ŝancon por la progresigo de Esperanto – kaj ili ne miru, se kreiĝas aliaj renkontiĝoj, kiuj zorgas ankaŭ pri tiu flanko de Esperanto-agado. Ju pli da internaciaj renkontiĝoj ekzistas, des pli da eblecoj ni havas bone informi la amaskomunikilojn.

Per raportoj en la amaskomunikiloj oni informas la ĝeneralan, ankoraŭ neinformitan publikon kaj krome ankaŭ tiujn, kiuj jam iom lernis Esperanton aŭ post kelktempa aktiveco intertempe retiriĝis. Informante per amaskomunikiloj pri la propra renkontiĝo oni laŭ tiuj du vojoj kontribuas longavide al la kreado de la propra celpubliko.

**Instruado: Gravas akompanado post la kurso**

Certe necesas ankaŭ, ke iu okupiĝu pri la instruado. La sperto montras, ke plej ofte troviĝas sufiĉe da instruantoj – malplenaj kursoj estas multe pli oftaj ol troplenaj. Plej verŝajne do ne necesas dediĉi multan aldonan zorgon al la baza instruado. Kontraste ofte kursanoj malaperas post la baza kurso – indas akompani ilin dum ilia plua lernado kaj ensociiĝo en Esperantujo, ĝis kiam ili atingis bone uzeblan lingvonivelon kaj memstare povas interretumi kaj viziti renkontiĝojn, akiri gazetojn kaj librojn.

**EsperantoLand: Renkontiĝoj kaj amaskomunikilaj rilatoj**

Por EsperantoLand la ĉi tie prezentitaj pripensoj signifas, ke ni zorgu ĉefe pri niaj renkontiĝoj, pri ilia bona organizado kaj la amaskomunikilaj rilatoj dum ili. Krome ni kreu pliajn renkontiĝojn, se estas publiko por tio – unuflanke por kontentigi la dezirojn de la publiko, aliflanke ankaŭ por krei pli da eblecoj informi la ĝeneralan publikon pri Esperanto. Se ni sukcesas bone informi, ni per tio kreas intereson de la publiko pri Esperanto. Estas atendeble, ke multaj homoj sukcesos iel kontentigi tiun intereson – informiĝante pri Esperanto en la reto kaj per libroj, poste lernante Esperanton per libro, iu kurso aŭ reta oferto. Iam almenaŭ parto de ili alvenos en niaj renkontiĝoj. Certe multaj perdiĝos survoje, sed verŝajne en la nuna fazo ne estas ebleco tion eviti.

Unu el la solvendaj demandoj estas, kiel ni povas dividi tiujn taskojn inter pluraj homoj, tiel ke ĉiu unuopa homo portas elteneblan ŝarĝon aldone al la bezonoj de la cetera vivo.

(Verkita 2008-07-03, redaktetoj 2008-09-13 kaj poste)